



KOMITAT-KUNSIDO

4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris - Métro Bastille

sabato la 12-a de septembro 2020, 10h-12h

0.1 Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj – 5 min

Persona nomo	Familia nomo	Mallong.	Komitataneco	Ĉeestas	Senkulp.	Forestas	Rajtigas
Alexandre	André	AA	Repr. de la membraro	S			
Claude	Bensimon	CB	Repr. de la membraro			X	SM
Raymonde	Coquisart	RC	Repr. de la membraro			X	AK
Bernard	Cornavin	BC	Repr. de la membraro			X	
Xavier	Godivier	XG	Repr. de la membraro	R			
Julia	Hedoux	JH	Repr. de la membraro			X	
Jesper	Jacobsen	JJ	Repr. de la membraro			X	
Maurice	Juy	MJ	Repr. de la membraro	R			
Aleks	Kadar	AK	Repr. de la membraro	S			
Michael	Leibman	ML	Repr. de la membraro (+ repr. ex fed. Rhône-Alpes)		X		GT
Didier	Loison	DL	Repr. de la membraro	S			
Jean-Lucien	Mazeau	JLM	Repr. de la membraro	S			
Sébastien	Montagne	SM	Repr. de la membraro	S			
Claude	Nourmont	CN	Repr. de la membraro	R			
Armand	Salek	AS	Repr. de la membraro		x		SM
Gilles	Tabard	GT	Repr. de la membraro + repr. fed. Limousin	R			
Flora	Markov	FM	Repr. de FET			X	
Michèle	Abada-Simon	MAS	Repr. de FKEA	S			
Didier	Janot	DJ	Repr. de GEE	R			
Lucas	Teyssier	LT	Repr. de JEFO			X	
Jean-Pierre	Boulet	JPB	Repr. de fed. Auvergne			X	
Josette	Ducloyer	JD	Repr. de fed. Bretagne			X	
Gilbert	Stammach	GS	Repr. de fed. France-Est			X	
Marianne	Pierquin	MP	Repr. de fed. Paris-Île-de-France			X	
Florian	Cezard	FC	Repr. de fed. Languedoc-Rouss.		X		DL
Michel	Dechy	MD	Repr. de fed. Nord			X	
Marie-France	Conde Rey	MFCR	Repr. de fed. Poitou-Charentes			X	
Pascal	Vilain	PV	Repr. de fed. Provence	S			

Partoprenis 6 komitatanoj **Rete** kaj 6 komitatanoj **Sideje**
kun Susanna kaj Lilianne kaj François Lo Jacomo.

0.2 Elekto de prezidanto kaj protokolanto – 5 min

DL prezidas

AA kaj JLM protokolas, kun provlega helpo de PV

0.3 Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj – 5 min

Neniu rimarko.

0.4 Protokoloj de la pasintaj komitat-kunvenoj – 10 min

Neniu kontraŭas, nek rete nek en la sidejo.

10h45 - sume 45 min (ink. 20 min por tekniko Zoom)

1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

1.1 Funkciado de la sidejo de UFE dum la trudizoliĝo - Informo 10 min (Susanna)

SB: la sidejo estis fermita dum la hejma restado pro KOVIM-19. La laboro tamen daŭris pertelefone kaj rete. Kelkaj libroj vendiĝis dum tiu periodo. La revuo *Le monde de l'espéranto* ankaŭ estis sendita al la homoj kiuj petis ricevi ĝin, kaj la kutimaj kalendaretoj estis ricevitaĵoj ĉe la sidejo.

DL kaj SB dankas kaj gratulas SB pro la laboro dum tiu aparta kriza situacio. Ankaŭ la normala poŝta laboro estis farita de SB.

DL: kompreneble ni vendis iom malpli da varoj kompare kun normalaj jaroj.

SM: ni ricevis ~2k€ de subvencio de DGFIP; kaj URSSAF faris proponon sed ne klaras ĉu ni povas jam peti ĝin aŭ ne.

1.2 Funkciado de la estraro en la lasta jaro - Informo 10 min (DL)

DL: mi konfesas ke mi estis for dum tiu periodo kiel prezidanto. Dankon al GT kaj la aliaj estraranoj pro la protokoloj, kunvokiloj ktp. Kiel anoncote en Dovro mi ne deziras esti prezidanto, temis pri nur papera helpo al la asocio ĉar ne estis alia propono. Mi estas esperanto ke la venonta estraro pli efike laboros.

GT: la nuna estraro estis speciala ĉar ni ne dekomence estis kandidatoj, necesis al ni multe da tempo antaŭ ol sperti pri la retaj iloj kutime uzataj por estri la asocion. Ni bedaŭras ke la asocio ne bone funkciis dum tiu periodo. La estraro tamen regule rete kunvenis per Framatalk.

AK: dankon al ĉiuj pro via laboro, ni scias ke kiel volontuloj ni ĉiuj faras tion, kio eblas.

1.3 Financaj aferoj - Informo - 15 min (SM/JLM)

SM: nur por la lasta jaro mi akceptis esti kasisto kaj mi do ripozos dum la venonta jaro. JLM helpis dum la lastaj monatoj. Ni rete kunlaboris, tiel ke li eksciis tiel, kiel funkcias la tuta afero (kapjeso de JLM). Dankon al JLM, espereble li daŭros plu labori pri tiu temo.

JLM: dankon. Mi opinias ke danke al SM mi estas konfida povi uzi la Arthur-pagosistemon.

11h00 - sume 15 min

2. KONSCIIGO (projektoj, ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

2.1 Jarkunveno de Greziljono (20a de junio) - Informo 15 min (FLJ)

FLJ: la jarkunvenon partoprenis ĉ. 15 homoj surloke kaj ĉ. samkvante perrete. La aŭgustaj staĝoj sufiĉe bone funkciis. Okazas luadoj, okazis renovadoj kaj konstru-laboroj (tegmento, ...). Endas plu konekti la kastelon al la publika kloako kaj antaŭenigi la restantajn ŝtupojn de la tegmenta renovado. Pri la ĉambro alirebla per ruloŝeĝo, preskaŭ ĉio estas nun en ordo. Tamen estus bone se alia dua tia ĉambro ekzistu. La prioritatoj devas esti ordigitaj.

De du jaroj Espéranto-France ne plu estas membro de la komitato pro la statutoj. Nun EF denove elektighis por la venontaj jaroj. Plej bone estus ke iu el la komitato de Espéranto-France reprezentu la asocion ĉe Greziljono.

DL: mi reprezentis la asocion en la kastelo, tamen post la morgaŭa jarkunsido-baloto mi – pro la statutoj – ne plu estos komitatano, do iu alia devos reprezenti la asocion... tasko por la venontaj komitatanoj!

2.2 Kunvenoj de korektantoj de Ikurso (majo-junio) - Projektoj de ikurso - Projekto de ekzameno - Informo 15 min (AR)

AR: okazis tri kunsidoj de ikurso-korektantoj dum somero. Ideoj aperis por plibonigi la retan kurson. Inter alie, ŝanĝi la finan tro facilan "ekzamenon". Ni povu verki ekzamenon laŭ la KER-sistemo, tiel ke la lernantoj unue konstataj ke ili facile povas atingi minimume la A1- kaj A2- nivelon kaj ke ili adaptiĝu al la KER-sistemo por trapasi la superajn sekvajn nivelojn. Dum la pasintaj jaroj per civila servo dungita de Espéranto-Loiret eblis antaŭenigi aferojn, sed nun ne plu eblas. Pro tio mi petas subvencion je 500 EUR, kvanto simila al dumonata laboro de civila servo.

CN: civila servo kutime unue ne bone regas Esperanton tamen post laborado ili fariĝas kompetentaj pri la lingvo.

AR: ni planas ke la 2~3 unuaj monatoj de civila servo estu dediĉitaj al instruado de Esperanto al volontulo, kiu poste laborus por ni por antaŭenigi la projekton. Laŭ mi tia volontulo povos verki la finan ikurso-ekzamenon post la jaro de civila servo.

MJ: bona projekto, vere. Sed mi nur hodiaŭ aŭdas pri ĝi. Eble estus pli logike ke la nova morgaŭe elektita komitato voĉdonu pri la projekto, ĉar hodiaŭ estas la lasta kunsido de la nuntempa komitato, eble indus finfini aferojn anstataŭ ol komenci novajn projektojn. XG kaj AA ja opinias, ke estus bone pli antaŭe ekscii. Tamen la projekto povas antaŭenigi.

AR: mi pretas morgaŭ ĉeesti por prezenti la projekton.

DL: dankon, ni voĉdonu hodiaŭ por savi tempon por la morgaŭa kunveno.

3 Sindetenoj, 1 kontraŭas. Aliaj komitatanoj konsentas. **Projekto APROBITA**

11h30 - Sume 30 min

3. KOMUNUMO (kongresoj, ...)

3.1 Jarkunsido de 2020 – Pripensado pri nova estraro elektota por la nova komitato – Informo 10 min (GT)

GT: tiel ke ne denove okazu malfacila transdono de estrareco, estus bone ke homoj povu helpi al la venontaj komitatanoj kaj estraranoj por ke ili “menso-pace” enposteniĝu.

AK: post unu jaro en la estraro vi sendube estas preta plu esti en la estraro.

GT: eble vic-sekretario.

AK: komprenite. Ne gravas.

DL: Estante vic-sekretario vi povos helpi la venontan, ĉu?

AK: morgaŭ diros.

3.2 Kongreso de Esperanto-France 2021 en Perigordo – Informo 15 min (RC-MJ)

MJ: Preparado pri la perigorda kongreso apud Périgueux kaj Trélissac glate iras. Tamen pro KOVIM-19 ni hodiaŭ ne scias, ĉu eblos okazigi la eventon laŭ la planita programo.

CN: ĉu eblus ke parto de la programo okazu surloke kaj alia parto rete?

MJ: Ja Claude Labetaa spertas pri Zoom kaj povos helpi se ni devas tiel elturniĝi. Pri la dato estos Ĉieliro, de la 2021-05-13a ĝis la 2021-05-16a.

DL: Dankon pro la daŭrigon de la surloka laboro.

11h41 - Sume 14 min

4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)

4.1 KER-ekzameno

FLJ: La 2020-11-28an okazos la tutmonda KER-ekzameno.

DL: Estos sesioj en Parizo (kaj eble Tuluzo?)

PV: post kelkaj monatoj eblos rete ekzameni: Katalin Kovac menciis tion kaj la ebleco trapasi A2- kaj C2-nivelon post monatoj.

FLJ: ja Katalin bezonas scii ĉu estos sufiĉe da kandidatoj por krei C2-nivelon. Volontuloj sin anoncu al ŝi.

DJ: Pri oficialaj KER-ekzamenoj mi konsilas spekti la lastan retkunvenon kun Katalin Kovacs pri nuna kaj nova modeloj de la KER-ekzamenoj

<https://www.youtube.com/watch?v=jHweCQ5mXHA> Inter la novaĵoj: virtuala ekzameno, kaj novaj niveloj. Pri C2 estas projekto aldoni tiun nivelon. Pri A2-nivelo je la fino (ĉ. 1:39) venas demando kaj respondo. Konkludo estas ke oficiala A2-ekzameno ne utilas por plenkreskuloj sed utilas por junuloj/ mezlernejoj. Zorgas pri tiu projekto Zsófia Kóródy.

PV: ankaŭ gravas trapasi la FEI-ekzamenojn, kiuj enhavas ankaŭ kulturajn kaj historiajn aspektojn.

Aldonaj demandoj

AK: mi deziras aldoni tagorderon por morgaŭ pri projekto de Francesco Maurelli.

GT: konsentite.

11h50 - Sume 9 min